A.E.A.-informilo

Numero 9 Oktobro 2011

# Heleco kaj A.E.A.-informilo en la biblioteko de U.E.A.

Nia presorgano **HELECO**, jam ekde ĝia ekapero, estis sufiĉe disvastigita en la esperantistaj medioj. Multaj E-grupoj, kaj landaj kaj eksterlandaj, ricevadis dum kelkaj jaroj la ekzemplerojn de ĉiu nova numero de nia revueto. En iu epoko la enhavo de la gazeto estis dulingva – hispana kaj esperanta– por esti distribuata ankaŭ en publikaj centroj de nia asturia regiono. La provo ne estis sukcesa en kio koncernas al la diskonigo de Esperanto en la socio, kaj **HELECO** denove fariĝis publikaĵo destinita al la geesperantistaro. Baldaŭ poste ekaperis nia paĝo en ***Interreto***, kaj ene de ĝi la revuo fariĝis alirebla por plej granda nombro da personoj en la mondo. Tamen, en papera formo **HELECO** plu estis distribuata al kelkaj E-asocioj, inter ili **HEF**. Sed estis por ni granda haj agrabla surprizo konstati ke nia presaĵo vekis la intereson de aliaj plej altaj esperantistaj instancoj. Sekve ni transskribas la mesaĝon kiun ni ricevis tiurilate el S-ro. Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de **Universala Esperanta Asocio**.

***Al Astura Esperanta Asocio:***

***Estimataj,***

***Kun granda intereso mi foliumis en via retejo numerojn de via organo "Heleco", pri kies ekzisto mi rememoris pere de "Boletín" de HEF. Jam pli frue mi eksciis pri ĝi kaj jam tiam intencis skribi al vi, sed ial mi fine forgesis fari tion.***

***Mi elkore gratulas vin pro tiu riĉenhava kaj bela eldonaĵo! Oni tuj konjektas, ke malantaŭ ĉiu numero necesis grandega laboro kaj tial estas vere admirinde, ke ĝi aperas jam tiel longe. Mi esperas, ke en estonteco ĝi aperos eĉ ankoraŭ pli longe!***

***Malfeliĉe "Heleco" mankas en la Biblioteko Hector Hodler de UEA. Se mi bone kontrolis, mankas ankaŭ via alia organo, "AEA-Informilo".***

***Mi tre ĝojus, se vi povus sendi al UEA la jam aperintajn numerojn, kaze ke ili ankoraŭ haveblas, kaj ankaŭ estonte sendi ilin. La biblioteko de UEA estas unu el la ĉefaj Esperanto-bibliotekoj kaj sufiĉe ofte vizitata de esploristoj. Ju pli kompleta estas ĝia kolekto, ankaŭ koncerne Esperantajn revuojn, des pli utila ĝi estas. Estas laŭdinde, ke viaj organoj estas konsulteblaj rete, sed ĉar ili estas enhave tre valoraj kaj zorge farataj, estus bone, se ili povus esti konservataj ĉe UEA en papera formo kaj tiel esti alireblaj al pli da interesitoj.***

***Se vi povos kontentigi mian peton, mi estos tre danka al vi. Antaŭ ĉio mi ankoraŭfoje gratulas ĉiujn, kies krea frukto estas la du organoj, kaj deziras multe da sukcesoj ankaŭ estonte!***

***Kun samideanaj salutoj,***


***Osmo Buller***

***Ĝenerala Direktoro***

***Universala Esperanto-Asocio***

La biblioteko de **UEA** portas la nomon de la fama svisa esperantisto Hector Hodler. Ĝi troviĝas en Roterdamo kaj estas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj, kun proksimume 20.000 libroj, cetere kun periodaĵoj, manuskriptoj, fotoj, sondiskoj kaj aliaj kolektaĵoj. Tiu biblioteko troviĝas en la ĉambro ***Zamenhof*** en la nova alo de la Centra Oficejo. Partoj de la arkivo de UEA troviĝas ankaŭ en aliaj ĉambroj. La Biblioteko Hector Hodler (BHH) okupiĝas ĉefe pri la lingvo Esperanto kaj parencaj temoj. Al la plej malnovaj libroj apartenas la "Unua Libro", kiun la lingvo-fondinto L. Zamenhof publikigis en 1887. Esplorantoj trovas materialojn pri Esperanto-literaturo kaj lingvistiko, pri aliaj planlingvoj kaj pri lingvistikaj kaj internaciismaj temoj ĝenerale.

De nun tiu grava biblioteko enhavos ankaŭ la kolektojn de **HELECO** kaj ***AEA-Informilo*** kiujn ni pretigis por ĝi, kaj regule ricevados la estontajn eldonaĵojn de tiuj organoj kiujn ni faros de nun. Por **Astura Esperanta Asocio** estas tre granda honoro ke nia modestaj pres-organoj staras en tiu gravega centro de la tutmonda esperantista kulturo.



S-ro Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de U.E.A.




HELECO-kolekto destinita al la Biblioteko de U.E.A.